1-a Jaro, N-o 50 APERAS S.A.T. SEMAJNE 10. Septembro 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktoro: N. BARTHELMESS Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz | Gvidanto: Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

# Cionismo — hebrea formo de ŝovinismo

## Ĉu Sat-ano povas esti cionisto?

Post la kongreso de SAT. kelkaj Sat-anoj scivolaj restadis ankoraŭ en la urbo de nia V-a por viziti diversajn rondojn esperantistajn. Dum sia vagado ili venis ankaŭ en societon kiu — kontraŭe al la ĝeneralaj kutimoj de la "neŭtralaj" esperantistoj — klopodas esti vere neŭtrala kaj kies anoj, homoj kun progresema mondkoncepto, ĝojas ke ilia klubo estas libera tribuno por plej diversaj opinioj.

Tie ni renkontiĝis kun cionistoj esperantistaj, venintaj Vienon por ĉeesti la nuntempe okazantan tutmondan kongreson cionistan. Vigla diskuto ekkomenciĝis, cionistoj kaj SAT-anoj klarigis siajn vidpunktojn. La parolbatalo estis interesega: ĝi montris ke la cionista doktrino estas parenco de la ŝovinistaj, naciemaj dogmaroj de ĉiuj aliaj popoloj.

Nature ĉiu el ni ja scias ke la cionista movado — escepte malgrandan eron socialistan — estas burĝa movado kun burĝa, naciema idearo, ke ĝiaj gvidantoj estas burĝoj kaj ke ĝiaj protektantoj estas la grandaj financaj kapitalistoj de la Ligo de Nacioj. Tamen la cionismo estas ofte konsiderata kiel progresema, pacifista, libereca. La furiozegaj atakoj de la plej reakciaj klikoj (faŝistoj, monarĥistoj, feŭduloj ktp.) kontraŭ la cionismo plifirmigis la opinion ke la nacia movado de la hebreoj okupas la plej maldekstran flankon de la burĝara fronto. Estas ja ankaŭ konate ke la luktado de la cionistoj estas ofte batalado kontraŭ subpremo, perforto kaj maljusteco naciaj, kaj ĝi pro tio ŝajnas enhavi revolucian elementon.

Kion celas la cionismo? Dekkvin milionoj da hebreoj estas dissemitaj en la tuta mondo, sur ĉiuj kvin kontinentoj. Multaj el ili perdis sian naciecon kaj alprenis lingvon kaj kulturon de la ŝtato en kiu ili vivas. Aliaj trans-naciiĝis, alprenante la nacian econ de alia popolo. Kaj granda parto suferas sub nacia premo kontraŭ la semidoj direktata. La hebreojn renaciigi, ilin konduki al Palestino, tie krei propran ŝtaton hebrean, sendependan kiel ĉiuj aliaj landoj — jen la celo de la cionistoj.

"Ekzistas scienco kaj arto francaj, germanaj, anglaj ktp.", diris la cionisto, "ekzistas scienculoj kaj artistoj hebreaj, sed ne ekzistas scienco kaj arto hebreaj, ĉar ekzemple la verkoj de Heinrich Heine, de Einstein k. c. estas ĝenerale konsiderataj kiel apartenantaj ne al hebrea, sed al germana kulturo. Ni volas ke tio, kion faris hebreoj, apartenu al ni, estu taksata kiel nia propraĵo. La lingvo, la konsiloj, la voĉo de niaj prapatroj estu niaj gvidiloj en la vivo!"

Ho ve! en tiuj vortoj de la cionista esperantisto jam malkovriĝas la tuta, fundamenta diferenco inter burĝa kaj proleta mondkonceptoj. La proletaro direktas sian rigardon en la estonton, ĝi studas la pasinton nur por ĉerpi el ĝi instruaĵojn por la nuntempa, porestonta batalo; la burĝaro timas la venonton: je ĉiu paŝo antaŭen ĝi sklavece penas imiti la agojn de la antaŭuloj. Ne ĉiam la burĝaro agis tiamaniere, sed jam depost longa tempo, la burĝa klaso, revoluciema junulo, en 1789 antaŭenkuranta senpripense, fariĝis hezitema, lama grizharulo, kiu ne kuraĝas plu rigardi antaŭen, ĉar la estonto al li anoncas la certan pereon. La burĝo vidas ajon tia kia ĝi *estas* en certa momento; la proleto vidas ajon tia, kia ĝi disvolviĝas. La cionistoj apelacias al la doktrinoj, la lingvo, la lando de siaj prapatroj, dume ni apelacias al la evoluo de la homa socio, al niaj propraj fortoj, al nia propra batalemo, al la estonto!

El tiu burĝa mondkoncepto rezultas ke la cionismo malhavas sencon por la historia realeco. En historia periodo, kiu metis sur la tagordon la liberiĝon de la laboruloj sur tutmonda skalo kaj en kiuj la naciaj liberigbataloj estas nur nacie maskitaj luktegoj sociaj inter klasoj, la cionismo volas solvi la nacian problemon de nur unu nacio ne tuŝante la socian fundon! En periodo, kies ĝenerala disvolviĝo iras al pli kaj pli malvasta alproksimiĝo de la diversaj nacioj, forviŝante pli kaj pli la naciajn karakterecojn, al kunfando ekonomia, politika kaj lingva de ĉiuj nacioj de la tero, la cionistoj volas — almenaŭ politike — apartigi unu nacion, ĉe kiu la internacia kunfandprocedo historia jam estas tre progresinta.

Ĉu vere estas tiel grava por la homaro, scii, al kiu nacio apartenis tiu aŭ alia grandulo? Ĉu D-ro Zamenhof kreis esperanton kiel hebreo aŭ simple kiel homo? Ĉu Einstein kaj aliaj grandaj hebreoj laboras por la *hebrea* aŭ por la *homara* scienco? Sufiĉas prezenti la demandojn por tuj konvinkiĝi pri la absurdeco de tia argumento.

Sed la konceptoj de la cionistoj estas ne nur burĝaj, kiel ĵus dirite: ili estas ne malpli naciemaj ol la ideoj de germanaj, francaj, anglaj aŭ aliaj ŝovinistoj. Se marokanoj, ĉinoj kaj aliaj koloniaj popoloj batalas por sia nacia liberigo kontraŭ la fremda imperialismo, ni komprenas tiun bataladon kaj eĉ simpatias kun ĝi, ĉar ĝi signifas por tiuj koloniuloj aŭ duon-

koloniuloj elkatenigon de grandaj produkciaj fortoj per detruo de feŭdaj proprajrilatoj, kaj krome por la grandaj potencoj imperialistaj, malfortigon de ilia rabfundamento. Sed la nacia batalo de la cionistoj ne havas tian karakteron. Ili ne plu bezonas sin liberigi el feŭdaj katenoj, ĉar ili preskaŭ ĉiuj jam vivas en kapitalistaj ŝtatoj, kaj ili batalas ne kontraŭ la imperialismo tutmonda, sed sub ties protekto, enkarnigita en la Ligo de Nacioj.

Ni, revoluciemaj proletoj, certe ne povas kontraŭstari nacian liberigon. Estante sennaciuloj, ni batalas por socio, en kiu ne plu ekzistu nacioj; sed ni tre bone konsciiĝas, ke ni estas nur pioniroj de malproksima estonto kaj ke la venontaj paŝoj de historio ne kondukos jam al forigo, sed al liberigo de la nacioj. Nur post certtempa ekzistado de la kolektivista asocio la nacioj malaperos iom post iom. La nobla celo: liberigo de la popoloj el subpremo kaj perforto, estas programpunkto de ĉiuj proletaj partioj. Sed ni devas nin demandi, per **kiaj** rimedoj la hebreoj estu liberigotaj, kaj ĉu la solvo proponita de la cionistoj estas bona.

Jam en 1844, Karl Marks skribis en broŝuro pri la "Hebrea demando", ke la liberigo de la hebrea popolo nur estas ebla en intima kunligo kun la liberigo de la laborista klaso. Kaj post kiam Germanujo, en 1871, estis aneksinta Alzason-Lotaringon, Engels avertis la francŝovinemajn alzasanojn kontraŭ provoko de nova milito german-franca, dirante ke la Alzasanoj povos atendi sian finfinan liberigon el prusaj katenoj ĝis la ĝenerala liberiĝo de la tuta laboranta homaro el kapitalistaj katenoj. La venko de l' proletaro kontraŭ kapitalismo liberigos ankaŭ la perfortatajn popolojn. Se la proletaro ankoraŭ devas atendi sian socian liberiĝon, la aliaj ne malhelpu per semado de ŝovinismo tiun grandan laboron historian.

La proleta solvo de la hebrea demando estas sekve tre simpla: la hebreaj laboruloj batalu en intima kuneco kun la proletoj de ĉiuj aliaj nacioj por sia socia liberiĝo el la ungegoj de kapitalismo. La venko en la granda socia batalo redonos al tiuj hebreoj, kiuj ĝin deziras, ilian propran naciecon — ĝis kiam estos triumfinta sennaciismo en la tuta mondo.

Fakte ni vidas: cionismo estas burĝa kaj ŝovinista movado. Ni certe rajtas, ĝin senkulpigi pli ol — ekzemple — la francan aŭ britan ŝovinismon, ĉar ĝi estas esprimo de rezisto de kelkloke subpremata popolo (oni memoru la hebreojn en Polujo, Hungarujo ktp.), sed SAT-ano ne povas aprobi nek subteni tiun movadon.

Kontraŭe al la ŝovinismo de aliaj popoloj, la cionismo ŝajnas porti nur pacifistajn, progresemajn trajtojn. Sed ankaŭ tio estas grava eraro. Kvankam la cionisto deklamis, en la menciita kunveno, la konatan verson: "Ne al glavo, sangon soifanta...", oni devas diri, ke la metodoj aplikataj de la cionistoj en Palestino ne estas pacifistaj. La hebrea nacio estas en Palestino reganta nacio — reganta sub brita, t. e. sub internacia financestrara protekto. La reganta nacio de Palestino formas 10 ĝis 12 procentojn de la loĝantaro!!! Ĝi ekspluatas kaj subpremas la arabojn, kiuj estas la grandega plejmulto en la lando. El la "lando de profetoj" fariĝis lando de profitoj, kaj araba sango jam kelkfoje ruĝigis la stratojn de palestinaj urboj.

Eĉ se la enmigrintaj hebreoj sin organizas — kiel rakontis la cionisto — grandparte sur kolektivista bazo, restas la fakto, ke tia "socialista" organizaĵo realiĝas sur la dorso de naŭdekonoj da ekspluatataj homoj nehebreaj, ne partoprenantaj tian organizaĵon kaj ne ĝuantaj la rajton de la premantoj. Tiu situacio similas la sistemon de la antikvaj tempoj, en kiu la demokratio ekzistis nur por la supera socitavolo de "liberuloj", dume la granda amaso da sklavoj estis senrajta, subpremata kaj ekspluatata.

La reakcia karaktero de la cionismo plej klare sin malkovris en la pozicio de la cionistoj rilate esperanton. Oni certe ne povas postuli ke burĝo fariĝu SAT-ano, ke li uzu esperanton por la klasaj celoj de la proletaro. Sed ekzistas inter la burĝaj esperantistoj du grupoj da homoj: ŝovinistoj, por kiuj esperanto estas taŭga rimedo por plej diversaj celoj, la Ellersiekoj ĉiulandaj [1] kaj idealuloj, por kiuj esperanto estas instrumento de progreso, de nacia alproksimigo. Por tiu lasta kategorio, kies iluziojn ni SAT-anoj ne akceptas, ni tamen sentas estimon, ĉar ili alcelas — per falsa vojo — la bonon de la homaro.

Bedaŭre ni devas konstati, ke la cionistoj esperantistaj ne apartenas al la idealista, sed al la ellersieka kategorio de la burĝaj esperantistoj. Ili tute ne volas konsenti ke esperanto kunhelpu por la kunfando de la nacioj, ĉar laŭ iliaj opinio kaj deziro, nacio devas eterne ekzisti. Ili eĉ timas ke esperanto disdialektiĝos, se ĝi estos ĝenerale parolata — opinio, kiun oni povas aŭdi ankaŭ el la buŝo de Mussolini, de Ludendorff, de Poincaré, de Churchill, de Horthy ktp. Se iu metas sian nacion super ĉion, li ne povas esti internaciulo, kaj ja tute ne sennaciulo.

El ĉio tio sekvas, ke SAT-aneco kaj cionismo estas same neakordigeblaj kiel SAT-aneco kaj iu alia naciismo.

*Lucien Revo.*

[1] S-ro Friedrich Ellersiek estas fame konata en la tuta mondo pro eldono, dum la imperialista milito, de gazeto esperanta "Internacia Bulteno", enhavanta la plej infamajn falsaĵojn kaj mensogojn naciemajn.

# El Angola

## I

### Vivo kaj moroj de indiĝenoj

S-ro Antonio Leite de Magalhães, eksguberniestro de la Angola'a distrikto Cuanza-Sul (Suda "Kuanza") ĵus publikigis raporton pri la distrikto, kiun li estris, kaj inter la diversaj aspektoj, sub kiuj li esploras la de li administritan regionon (geografio, historio, politiko, etnografio, ekonomio, k. t. p.) mi trovas tre interesan ĉapitron priskribantan la vivmanieron kaj morojn de indiĝenoj.

Kvankam tiu priskribo koncernas nur la diversajn indiĝenajn gentojn el distrikto Sud-Kuanza, oni povas ricevi per ĝi sufiĉan ideon pri la moraro de Angola'aj indiĝenoj ĉar ĉi-moroj estas, kun diversaj nuancoj, pli-malpli similaj al tiuj de la ceteraj distriktoj.

Mi prezentas al legantoj de "S." sufiĉe detalan elĉerpaĵon el tiu Raporto klarigitan kaj korektitan aŭ mallongigitan en la punktoj, kie la aŭtoro respeguligas sian burĝecan ideologion.

Ni komencu, samkiel la aŭtoro de l' Raporto, per priskribo de la ĝenerala vivmaniero de l' indiĝeno.

* * *

Laŭ nutradformo, la indiĝeno estas omnivora (ĉionmanĝanta), sed la viando estas la manĝaĵo de l' solenaj tagoj.

La vegetaĵoj konsistigas, verdire, lian ĉiutagan ekskluzivan nutradon. En la maizo, manihoto [1]), fazeolo, patato [2]), arakido [3]), kukurbo, fungoj, sovaĝaj fruktoj kaj palmoleo li trovas siajn plej necesajn nutrosubstancojn. La maizo, post senigo de la brano kaj infuzo en varma akvo dum du aŭ tri tagoj estas farunigita per pistilo kaj kribrita en la "kjanda" (speco de korbo farita el palmfoliaj rubandoj) kaj tiamaniere formas la tielnomatan "fuba"n, kiu knedita en bolanta akvo, reprezentas la panon de la indiĝeno. Kaj, kiam li ne uzas la "fuba"n de maizo, li manĝas tiun el manihoto, kiun li akiras per la farunigo de tia tubero, senŝeligita kaj sekigita en la suno post kelkaj tagoj de subakvigo en fluanta akvo. Per tiu procedo la manihoto preskaŭ putriĝas, almenaŭ acidiĝas. Ĝi tiam ricevas la nomon "bombo". Ordinare, ia bolita saŭco kun palmoleo kaj salo (kelkfoje ankaŭ pistitaj folioj de manihoto aŭ de patato) donas ian guston al tiu malplaĉa pastaĵo, kiun li nomas "funji" aŭ "infunji". Plurfoje, kiel stimulilo estas uzata la ruĝa pipreto ("jindungu"). La rostitaj maizo aŭ arakido, patato aŭ manihoto, la kuiritaj aŭ spicitaj fazeoloj aŭ kukurbo, la fruktoj, ĉu sovaĝaj, ĉu ĝardenaj, kaj, je bonŝancaj tagoj, la viando de l' sovaĝaj bestoj (inkluzive la ratoj kaj la kolubroj) kaj la fiŝoj de l' riveretoj kompletigas lian nutradon. Kiel ekscitantoj la fumon de l' tabako, ili kulturas kaj tiun de l' kanabo ("liamba" aŭ "kan-

[1]) Tropika vegetaĵo (arbetaĵo).
[2]) Terpomeca tubero.
[3]) Ternukso.

gonja“), kiu kreskas senkulture, kaj la fermentitajn trinkaĵojn, kiujn la indiĝenoj, ĉu eltiras el la palmarboj (“maluvu“) aŭ preparas per akvo kaj maiza “fuba“ kun aldono de la pistita radiko de planto nomata “muŝiri“. Ankaŭ la mielakvo (“kitete“ aŭ “kingundo“) satigas la drinkemon de la indiĝeno.

Dumtage li manĝas ĝenerale tri fojojn: la unua manĝaĵo, frumatene, konsistas el rostita maizo kaj fruktoj (la arakido aŭ rostita manihoto kelkfoje anstataŭas la maizon); la du ceteraj, je la 11-a aŭ 12-a horo kaj je la vesperiĝo, estas formataj per la “funji“ kaj spicitaj aŭ kuiritaj fazeoloj kun fiŝo aŭ viando . . . se ĉi-lastaj hazarde ne malestas.

En la tuta distrikto Sud-Kuanza nur la raso *“Ba-Sele“* havas certan tradicion pri antropofagismo (homomanĝemo); sed la rasoj *“Amboin“* kaj *“Libolo“* posedas ankaŭ tiun famon. Tio, tamen, ne estis kutimo konsekvenca de speciala prefergusto por la homkarno. Ĝi aspektis kvazaŭ formo de justecapliko, eble bazita sur ia superstiĉa kredo. Ili ja nur manĝis la militkaptitojn, la rabistojn kaj la ricevitajn kiel pago de mortintoj sklavojn, kiuj ne trovis aĉetanton.

Ili terkulturas kaj paŝtas brutarojn. Ili ankaŭ ĉasas kaj fiŝkaptas. Sed precipe en la terkulturado ili serĉas siajn vivsubtenaĵojn. La viro preparas la kampon, havanta kiel ilojn, malgrandan hakilon (“djabite“), la “katana“n (longlarĝa tranĉilego) kaj la fosilon. La virino semas, zorgas kaj rikoltas. La procedoj estas tute simplaj: rapida displugo; la fajro transformanta en pliboniganta cindron la falĉitajn herbojn; mallonga fosado por turni la terbulojn; la semoj manĵetitaj en kavaĵojn ĵus faritajn per pinta bastoneto aŭ eĉ per la fingroj kaj poste . . . la pluvo prenos sur sin la ceteron. Post unu aŭ du purigoj de la kampo per senigo de l' malutilaj herboj, la rikolto alvenas. Kaj ili faras preskaŭ ĉiam du rikoltojn dumjare: la unua en februaro — maizo kaj arakido; la dua en oktobro — maizo, fazeolo kaj manihoto. Ili ankaŭ kulturas la rizon. Ĉiudujare la kampo ripozas, sola rimedo kontraŭ ĝia eluziĝo. Kelkfoje ili kulturas ankaŭ por vendado la terpomon kaj la bulbon, sed en tre malgrandaj kvantoj. La indiĝenoj *“Ba-Nano“*, el Kasonge, kulturas grandskale la ricinon eble tial, ke ili trovis en ĝi, por grasumi la hararon, anstataŭaĵon de la palmoleo, kiun ili ne posedas. Kelkajn kafarbajn indiĝenajn kulturojn oni ankaŭ trovas ie aŭ alie.

Pri la paŝtado ili okupiĝas tre malmulte. Cetere la bovoj estas troveblaj nur en iaj regionoj de la distrikto. Nur la porkoj, kaprinoj kaj ŝafinoj iom abundas. La indiĝeno avare komercas per ĉi-lastaj, ĉar li rezervas ilin preskaŭ ekskluzive por siaj idolaj ceremonioj aŭ por la festotagoj.

Kiel ĉasistoj, la enfalujoj kaj ŝnurkaptiloj, kiujn ili ĝenerale uzas, estas tre malmulte fruktodonaj. Grandkvantan ĉasaĵon ili nur akiras, kiam bruliginte la sekajn herbojn de l' grandaj “anjaraj“, kie kaŝiĝas la antilopoj kaj aproj, ĉiuj bestoj terurigite forkuras tra la perfidaj liberspacoj, kie la sago, la “zagaja“ kaj la bastonego de la indiĝeno mortvunde ilin atingas.

Tiam estas granda festo en la “sanzala“. En la “libata“ [1]) de l' “soba“ [2]), antaŭ ties kabano, rondariĝas la tuta loĝantaro ĝisgrunde kurbiĝinta, kvazaŭ kisante la polvon, per fideljuro oferdonanta al la supera aŭtoritatulo la tutan kaptaĵon, kiu amase kuŝas en la mezo, surgrunde. La “soba“ kaj liaj “kilamba“j [3]) sidiĝas antaŭ ili kun siaj edzinoj kaj geinfanoj, bastono en mano kaj ĉapeto surkape — insignoj de estreco — kaj la plej bonaj pecoj estas por li.

La saman ceremonion ili ĉiam faras antaŭ ol prepari la kuiradon de ĉiu, eĉ unusola, viandaĵo ĉu besta . . . ĉu homa.

La fiŝkaptado estas praktikata nur de la indiĝenoj el la marbordo aŭ loĝantaj sur la riverbordoj. Diversajn procedojn ili uzas: en la maro, ĝenerale, la hoko ĵetita de sur malpeza floso; en la riveroj, la narkotikaj plantoj, korbo, tra kiu pasas la akvo, kaptanta la fiŝojn kaj metita en diversaj preparitaj aperturoj, k. a.

Esceptinte la fruktojn kaj, kelkfoje, la molan maizon kaj la pataton, ĉiuj iliaj nutraĵoj estas preparataj sur la fajro. Ili akiras ĉi tiun frapante ferpeceton kontraŭ silikeron, aŭ frotante per turnmovado, laŭ la procedo de la zuluuloj [4]), du pecojn da malsammoleca ligno, el kiuj tiu pli mola estas traborita kaj kontaktigita kun facilbruligebla meĉo, sur kiu la fajro naskiĝas. Nune, la alumetoj ekmalaperigas ĉi-prauzadon. *J. P. B.*

[1]) Palaco, loĝeja kvartalo de la “soba“.
[2]) Indiĝena reĝo, ĉefo de unu aŭ de kelkaj “sanzala“j.
[3]) Ministroj aŭ konsilantoj.
[4]) Konata afrika raso.

# Al scio de tutmonda proletaro

En Lwów estis mortpafita konata provokisto Cechnowski, kiu estas en Polio bone konata per la Bogiński-Weczorkiewicz proceso en Warszawa. Li estis mortpafita per tri pafoj de la 20jara Naftole Botvin. Tio okazis en la strato Trybunalska, ne malproksime de la juĝejo, kie Cechnowski estis en tiu-ĉi tago atestanto, pri la afero de la atenco je la respublika prezidanto en la jaro 1923. Botvin estis arestita; Botvin en la policejo klarigis ke li mortpafis Cechnowski'n, ĉar li estis provokisto en revoluciaj rondoj; en tiu-ĉi ago neniu lin helpis, sed ne rigardante je tio estis arestita tuta lia familio, patrino kaj du fratinoj, oni ilin enkarcerigis kune kun diversaj krimulinoj kaj prostituitinoj, kie ili estis terure traktitaj. La proceso devis okazi dum 14 tagoj, kaj oni komencis tuj „esplori“ Botvin'on, li estis batita, oni postulis ke li citu la aliajn kunhelpantojn. Sed Botvin ne atentante la turmentojn ĉiam klarigis, ke li mem sen ies ajn helpo mortpafis Cechnowski'n. Ne rigardante tion, ke Botvin estas ne plenaĝulo, li tamen estis starigita al rapid-juĝo kaj kondamnita al mortpuno. En la tago (la 6. 8. 25) de la juĝo oni vidas stratojn plenaj per polico, la stratoj estis ankaŭ plenigitaj de homamaso. En la juĝejo oni vidas nur detektivojn kaj korespondantojn de diversaj gazetoj. La horo jam estas 10., kiam oni enkondukas Botvin'on, kiu estas malhel-blonda kaj pala junulo, vestita en griza kostumo. Ĉirkaŭas lin dek policanoj kun la revolveroj en la manoj. Al demando de la juĝisto: “Al kia nacio vi apartenas?“ Botvin respondas: “Al nenia!“ Al demando: “De kia religio?“ Botvin respondas: “Mi ne kredas al iu ajn religio.“ En la kondamna protokolo estas skribite ke “Naftole Botvin mortigis ŝtatan serviston, dum li plenumis sian ŝtatan servon“. Sed la juĝistaro eĉ ne konstatis, ĉu Cechnowski efektive estis “ŝtata servisto“, kaj la fakto mem ke Cechnowski estis mortpafita sur la strato, neniigas ke li plenumis sian “ŝtatan servon“. (Ankaŭ la enterigo, kiu okazis en Varsovio [La korpon de mortinto oni transportis Varsovion] okazis tre simple. Krome el la parencoj neniu partoprenis la enterigon. Tio montras ke eĉ la diversaj ŝtataj servistoj, kiuj ordinare partoprenas en similaj enterigoj, hontis partopreni en enterigo de tia aĉa provokisto.) Sed tamen post mallonga procedo la juĝistaro proklamas mortpunon por Botvin per pafigo. Botvin aŭskultas tute trankvile, eĉ rideto montriĝas sur la pala vizaĝo. La ekzekuto devas okazi 2 horojn post la proceso. La defend-advokatoj postulas prokrasti la ekzekuton ankoraŭ por unu horo, por ke Botvin havu tempon por adiaŭi la parencojn. En la sama ĉambro kie estas Botvin, la juĝistoj faras mallongan konsiliĝon kaj plenumas la peton de la advokatoj. Samtempe la advokatoj sin turnas telegrafe al la respublika prezidanto, ke li kiel “plej alta potenco“ neniigu la mortpunon. La advokatoj sin apogas je tio, ke la respublika prezidanto mem kaj Pilsudski (kreinto de la pola armeo) estis mem persone anoj de partio laborista, kiu uzis teroron (P. P. S. dum carismo). La mortpuno devas okazi 10 minutojn post la 1. Oni forkondukas Botvin'on kiu estas eksterordinare trankvila, oni lin enkondukas en la malliberejan fermitan veturilon, ĉirkaŭitan de tuta taĉmento de policanoj. Dum la veturilo traveturas la stratojn, oni aŭdas kiel Botvin kantas la “Internacion“ kaj “Ruĝa Standardo“, en la stratoj estas ĉirkaŭ 100 000 homoj. Kiam la veturilo enveturas sur la mallibereja korto, Botvin kantas la revolucian kanton “Sur barikadoj“, la kelkaj centoj da kamaradoj, kiuj estas arestitaj kiel “kontraŭ-ŝtataj krimuloj“, ekaŭdas la revoluciajn kantojn de Botvin, kaj ili komencas kanti kune kun Botvin. Oni lin enkondukas en la ĉelon, alvenas la parencoj, la patrino kun du fratinoj; post adiaŭo kun la patrino, kiu estas kvazaŭ ŝtonigita, li adiaŭas la fratinojn, kiuj ege ploras. Eniras la rabeno; sed ekrigardante kiu eniris, Botvin klarigas ke li estas ne kredema kaj petas la rabenon forlasi la ĉelon kaj lasi lin en trankvilo. La patrino kiu volas

ke li mortu "kiel judo", petas la rabenon ke li provu duan fojon, la rabeno eniras sed Botvin simple diras al la rabeno: "Iru for! Kredema estas nur senkonsciulo". Jam estas la unua, la ekzekuto devas okazi sur la mallibereja korto, en la korto regas eksterordinara silento, oni nur vidas taĉmenton de 26 soldatoj kun oficiro, kelkajn korespondantojn, prokuroron kun la kondamna protokolo en la mano. Estas ankoraŭ 10 minutoj ĝis la ekzekuto, sed respondo ankoraŭ de la resp. prezidanto ne alvenis. Kvin minutojn antaŭ la ekzekuto eniras en la ĉelon, kie troviĝas Botvin, la defend-advokato Hacker, kiu kun premita voĉo klarigas, ke la prezidanto rifuzis la peton pri neniigo de mortpuno. Botvin, kiu estas eksterordinare trankvila, respondas; ke oni tute ne devis peti la prezidanton, nur "vanaj vortoj." La advokato premas la manon de Botvin kaj adiaŭas lin. 10 minutojn post la 1-a Botvin estis forkondukata el la ĉelo. Kiam Botvin forlasas la ĉelon, li komencas kanti "Internacion". Tuta malliberularo kunkantas. Kiam Botvin eniras la malliberejan korton, li komencas kanti la konatan revolucian kanton "Honoron al vi, tiranoj". Ĉiuj k-doj en la malliberejo kunkantas, estas ega majesta kantado, la kantadon oni eĉ aŭdas en la malproksimaj stratoj, kiuj estas plenigitaj de homamaso. Botvin kuraĝe kantante aliras al la muro kie pendas sako plenigita de pajlo kaj stariĝas apud la sako. Subite aliras iu, kiu donas al Botvin bukedon da floroj, oni tuj arestis la nekonatan k-don. Kiam oni volas ligi al Botvin la okulojn, li ne lasas fari kaj klarigas, ke "mi ne timas la morton, oni povas jam pafi, mi estas preta". Ok soldatoj kun oficiro staras kontraŭ li, kaj kiam la oficiro donas ordonon "pafi", Botvin ekkrias "Vivu la Mond-Revolucio". Ekaŭdiĝas pafo de ok pafiloj, kaj Botvin falas morta kun kapo trapafita de kvin kugloj. —

Per la mortigo de Botvin la burĝaro pola volas "timigi" la batalantan proletaron, sed la burĝaro eraras. La burĝaro povis mortigi Botvin'on sed ĝi ne povos kaj por ĝi ne estas eble mortigi la lastajn vortojn de kamarado Botvin "Vivu la Mond-Revolucio". Tutmonda proletaro! ni honoru lian memoron kaj ni batalu ĝis ni prenos en niaj propraj manoj la regadon. Ni batalu, ĝis ni venkos!

Speciale verkis por S.
*Vivulo.*

# TRA LA KLASBATALO

En Kanton okazas revoluciaj bataloj, por firmigi la regadon de revolucia partio en la urbo.

La laborista delegitaro germana revenis el Sovetio kaj raportis pri siaj impresoj antaŭ la laboristaro en Stettin kaj Berlin.

Komenciĝis proceso kontraŭ iamaj gvidantoj de kom. partio germ. (Maslow) pro preparo k. partopreno je "ŝtatperfidaj entreprenoj"

Ĝeneraliĝis kaj plivastiĝis en la britaj kolonioj (Aŭstralio, Nov-Zelando, Sud-Afriko) la marista striko.

# Estonio

## la lando de laborist. grandprocesoj

Antaŭ nelonge pasis laboristaj grandprocesoj kun ekzekutoj kaj dumvivaj punlaboroj. Ĉiuj ja konas ilin. Ili nomiĝis "115", "149" kaj la multaj aliaj malpli grandaj, krome amasaj mortigoj post la "1. decembro". Nun, antaŭ nelonge, prepariĝis ree iu nova, nomata "75". Preskaŭ antaŭ unu jaro oni kaptis en suda Estonio gvidanton de laborista movado, Hans Heidemann, kaj aliajn multajn kamaradojn (ilia nombro superis 100). Post longaj turmentadoj en malliberejoj oni parton liberigis kaj la alian restintan parton "ekjuĝis".

Generalaro, nomata "militjuĝejo", komencis en mezo de julio sian filaboron, kiu daŭris preskaŭ du semajnojn. En procesurbo Tartu estis rekonstruita iu grandega salono por "juĝejo". Sur la stratanguloj estis gluitaj afiŝoj, kie oni admonis homojn, malpermesis kuniĝon sur stratoj de pluraj personoj kaj ekhalton proksime ĉe la "juĝejo", kaj ceteraj singardaĵoj.

La "kulpulojn" oni pelis al la "juĝejo" en rondo de rajdpolicistoj, soldatoj, detektivoj, arestgardistoj ktp.

"Juĝado".

La ĉefatestantoj estis estroj de politika polico, inter aliaj ankaŭ iu 10jara knabineto.

Ĉiujn oni kulpigis pro "intenco perforte renversi la nunan ŝtaton", kio estas malpermesita en §§ 100 kaj 102, kaj kiuj antaŭvidas mortpunon kaj dumvivan punlaboron. La tuta kulpigmaterialo apogis sin al kelkaj gazetoj, broŝuroj, ĉifroj kaj al agentsciigoj pagataj.

La famkonata prokuroro de laboristaj procesoj, kol-leŭt. Trakmann, postulis por la "ĉefkulpulo" H. Heidemann mortpunon kaj por la aliaj ĝis dumviva punlaboro, ĉar ili helpis konscie aranĝi "triulojn". Kio estas "triuloj"? Tiun demandon eĉ la "juĝejo" ne povis klarigi:

Post parolado de l' prokuroro komenciĝis "defendparoloj" de l' advokatoj, dungitaj de la militjuĝejo. Ĉiuj ili parolis preskaŭ la samon, ke iliaj defendatoj, nomataj de l' "juĝejo", helpis senkonscie al la gvidantoj.

Post kontraŭparolo de l' prokuroro al la advokatoj, la lastaj diris ankoraŭ kelkajn vortojn.

Unu el ili diris: Juĝejo povas kondamni nur tiujn, kiuj estas persone kulpaj. Sed kondamni pro tio, ke iu legis aŭ havis sub sia kapkuseno gazeton, kiun oni povas laŭleĝe aĉeti, tio ne estas justa.

Iu alia: Malklaran rolon ludas en la kulpigo nome la ĉifraj leteroj. Reĉifritaj estas nur vortoj; sed ne la enhavo. Oni trovis tie nur familinomojn. Kaj homoj samnomaj estas multaj. Kion signifas la literoj *k* kaj *a*, aldonitaj al kelkaj nomoj? Ĉi-ĉion ni ne scias. Kaj ĝis kiam ni tion ne scias, ni povas neniun kulpigi laŭ tiuj ĉifroj.

Nun estis fino de l' diskutoj, la "juĝejo" rajtigis la "kulpulojn" diri ilian lastan vorton. Ĉiuj krom kelkaj postulis liberigon, kaj ilia lasta vorto daŭris nur plurajn minutojn. Pli longe ol duonan horon parolis k-do Heidemann. Li ekparolis per voĉo trankvila kaj laŭta:

"Laŭ mia opinio oni volas per tiu ĉi proceso malhonestigi kaj makuligi la laboristan movadon kaj malaltigi valoron de l' homoj." —

Sian agadon li karakterizas jene:

"Kiam mi plu ne povis legale zorgi pri laborista movado, mi opiniis necesa tion fari mallegale, ĉar mi estis konvinkita, ke la ĝisnuna laborista movado estis sur la ĝusta vojo. Kiam mi ekagis mallegale, estis facile forkuri al Rusio, kaj laŭ persona bonfarto ankaŭ pli bone. Sed mi elektis la plej malfacilan, sciante ke antaŭ mi estos malfacilaĵoj kaj fiaskoj kun faletoj, kie oni eble plu ne povos leviĝi. Ekagante mi penis labori ĉie, donis instrukciojn al laboristaj partioj, agis ĉe kulturistoj, paroladis pri alkoholo ktp. . . ." — Pri la agentsciigoj pagataj li diris jenon:

"Same kiel ĉe la juĝeja antaŭesploro, same ankaŭ dum nuna momento estas al mi neklare, kiaj estas la konkretaj sciigoj, ke ĉe mi trovitaj paperpecetoj estas nomaroj de armitaj grupanoj. Tiuj 119 nomoj estis homoj, disportintaj agitmaterialon en jaro 1923, dum elektado de 2. parlamento. Ke ĝi ne estis armita grupo, tion pruvas ankaŭ la multkolora arestitaro. Pli aŭ malpli frue povos la arestitoj pruvi, ke ili ne estas kun mi agitintaj. Ili estas petintaj de mi neniajn informojn aŭ instrukciojn pri aranĝo de batalgrupoj . . . .

Dum naciaj grandokazaĵoj, ĉu ĉe faŝistaj aŭ aliaj ribeloj, ekagos plej unue komunistoj, ĉar ni scias ke oni nin tiam multajn pendigos kaj la situacio de laboristoj kaj kamparanoj estos malpli bona, ol ĝis nun. Jam ekzistas tia minaco al renverso de la ŝtatoj. Ni ne povas determini en kalendaro, kiam ĝi okazos, sed ĉe nunaj kontrastoj de l' socio ĝi estas okazonta . . .

Mi havas nenian imagon pri provizoj de armiloj; en kontraŭa okazo mi estus zorginta pri tio, ke mi havu pli bonan revolveron, ol tiun rustintan. Tiu kulpigpunkto estas elpensita nur por kolorigi la proceson kaj kondamni kelkajn homojn pli kruele . . .

Pri spionado dum la milito, en jaro 1919 mi scias nenion, la punkto estas aligita nur por povi mordkondamni min. Ne estas montrite en la kulpigakto, kiam kaj kie okazis la spionado . . . Estas komike al mi, ke mi devas tiom multe, multe paroli pri aferoj, kiujn mi ne estas farinta . . . Tion postulas vivinstinkto kaj emo konservi la vivon. Kondamnu min pro kontraŭŝtata agitado. Mi ne timas mortpunon, sed tre strange estas morti pro kulpaĵoj, kiujn mi ne estas farinta. Mi esperas ke la burĝa juĝejo kapablos diferencigi faktojn kaj elpensaĵojn . . . Mi estas konvinkita, ke vivi por ĝeneralaj

interesoj de la socio estas pli ideala ol por niaj propraj interesoj. Oni volas per nuna proceso ree makuligi laboristan movadon, sed mi esperas ke laborista movado daŭrados nemakulite kaj ne atentante tion . . . "

Fine li diris, ke konforme al la leĝoj de militjuĝejo § 737, oni ne permesis al li havigi advokaton. Sian lastan diron li petas protokoli: "Justeco"?!

La milita juĝantaro foriris por prepari "verdikton". Post ĝia reveno aŭdiĝis la "justa verdikto":

Ekzekutota per mortpafo estas Hans Heidemann, dumviva punlaboro al Voldemar Telling kaj Emmeline Tooming. Al la restintaj kune 400 jarojn da plej severa punlaboro. Liberigotaj 5 homoj. — Tiel! —

Niaj plej bonaj kamaradoj estas mortpafitaj de l' burĝaro, miloj turmentiĝas en plenŝtopitaj malliberejoj kaj pro manko da loko en subteraj keloj, kie neniam vidiĝas sunlumo. Ni restintaj malsatas, vegetas. Nin atendas la sama sorto: pendigiloj, mortpafoj kaj dumvivaj punlaboroj. Ĉu ni rigardu trankvile kiel oni ekzekutas niajn kamaradojn kaj poste nin? Ne! En laboristmasoj fermentas io! Kaj oni sciu, ke ju pli multe oni nin turmentas, des pli multnombraj ni iĝas kaj tiam:

. . . *malnovan mondon ni detruos ĝis fundament' de l' tirani'!* *Joto.*

# Protokolo

## de la Va SAT-Kongreso en Wien 11.—15. aŭgusto 1925

### Kvina laborkunsido, 13. aŭgusto matene

### Organiza problemo

K-do *Richter* malfermas, legante saluttelegramojn

K-do *Deubler*-München: En landoj, kie ekzistas forta laborista movado, ankaŭ la ideo de mondlingvo estis pli favore akceptata de la laboristaro ol en aliaj landoj. Estis fonditaj lab. esp. organizajoj, kiuj celis disvastigi la lingvon. Por kontakti kun k-doj, kiuj havas la saman ideon, venis la penso, krei naciajn esp. organizajojn. Antaŭ la milito nur ekzistis tiaj organizajoj naciaj. Krome ekzistis tutmonda esp. gazeto por laboristoj (Internacia Socia Revuo). Tre bone ĝi plenumis siajn taskojn. Kun ĝojo oni povis konstati, ke la k-doj same kiel nun pritraktis la temon, kiel utiligi esp-on por la proletaj celoj. Ankaŭ tiam oni pridiskutis la organizan temon. Oni serĉis antaŭ la milito neŭtralajn nomojn, por eviti la persekutojn tiamajn. Nur la nomon "laborista" portis la asocio (ne socialista aŭ komunista). Do la nomo tiam estis neŭtrala. Oni intencis fondi Internacian Laboristan Asocion, speciale ni celis propagandi esperanton, kaj poste, se oni havas sufiĉe da anoj, ankaŭ utiligi esp-on por la klasaj celoj. Antaŭ la milito ankaŭ ekaperis "Liberiga Stelo". Ĝi estis aranĝita laŭ individua principo. Kiun nomon doni al la nova asocio kreota? Se ni estus donintaj la nomon "Komunista Asocio Esperantista", tiam persekutoj estus okazintaj. Kaj se "Socialdemokrata Asocio Esp.", tiam la komunistaj elementoj estus repuŝitaj. Venis kelkaj projektoj. Kelkaj pensis, ke la ideo estas bonŝanca, krei *partiajn* organizajojn esp-istajn. Aliaj kontraŭdiris, ke oni devas kolektive klopodi en unu organizajo, kiu 1) kunigas ĉiujn klaskonsciajn laboristojn, 2) permesas aliĝon de simpatiuloj. Se ni nur enirigus klaskonsciulojn, ni ne havus kampon, por varbi novajn adeptojn. Ni ne devas eduki la jam edukitojn, sed ni devas varbi por nia idealo novajn. Organizaĵo, kiu kunigas la klaskonsciulojn kaj havas kapablon kunigi la aliajn, kies spiritstato estas akceptema por nia ideo. En Praha landaj organizajoj ne sendis reprezentantojn (krom LEA germanlingva). Oni tute ne povis efektive, rajte priparoli temon, kiu rilatas la LEA-asociojn. Kompare kun UEA, kiu estas simile strukturita (praktika utiligo, servoj) plej bone akceptita en Praha, ankaŭ favore estis akceptata la ideo "sennacieca" (aŭ antiŝovinista). Ĉar la ŝovinismo post la milito sukcesis tiel forte, ke nur per la ŝovinisma pensado venkis la reakcio. Tial la ideo de antiŝovinismo estis taŭga por kunigi laboristojn. Ĉar la nomo "Sennacieca Asocio Tutmonda" estas neŭtrala. Kaj ĉi tiun neŭtralecon ni nepre bezonas en la tutmonda org-aĵo. Ofte diferenco inter "komunista" kaj "socialdemokrata" laboristo tute ne ekzistas, se oni ilin demandas pri ilia percepto. Laŭ lokaj cirkonstancoj estas diferencoj, agas tiu aŭ la alia partio pli prudente. Nin disigas nur diverseco de la ideoj pri vojo, kiu kondukas al komunismo. Ni ja nur havas la taskon, doni niajn servojn al la laboristaj org-aĵoj. La organiza formo trovita en Praha tiutempe estis la plej bona. Ĉiu esp-isto povis aliĝi, kaj krome la aliĝintaj k-doj estis anoj de landaj lab. esp. org-aĵoj, kie ili povis plenumi la varban laboron. Sed *ĝojige* la cirkonstancoj ŝanĝiĝis. La SAT-anaro jam nombras 3000. La unuopa laborado kaŭzas al CK multe da laboro. Certe la administracio profitus, se la organiza formo permesus al la EK, interrilati kun k-doj, kiuj estas kompetentaj en multaj rilatoj. Parte ni devas ankoraŭ varbi por esp-o, ĉar en la venontaj jaroj ni ankoraŭ ne povas atendi enkondukon de esp-o en la lernejojn. La sperto montris, ke nur tiuj k-doj povas aliĝi al SAT aŭ LEA, kiujn ni mem instruis. En Sudbavario ni ne havas unu membron en SAT aŭ LEA, kiu estis instruita de burĝaj esp-istoj. Se ni volas havi defendantojn de nia ideo, ni devas mem varbi kaj ankaŭ instrui ilin. Estas malfacile kurslernantojn teni ĉe la movado kaj interesigi por SAT. Kelkiuj ekzistas, kiuj nur volas esti membroj de SAT. Tio devigas min, denove pritrakti la organizan temon. Estonte ne estu necese, aparteni al du organizajoj. Ni jam devas esti membroj en tiom da org-aĵoj neesp-istaj, ke ŝajnas tute esceptite, devigi iun, aliĝi al *du* esp. org-aĵoj. Novuloj eĉ ne komprenos, kial ni bezonas du org-aĵojn. La nuna Kongreso studu la problemon, elektu komisionon, kiu interrilatu oficiale, en la nomo de SAT, por ke oficiale la LEA-asocioj rajtu trakti pri "unuecigo de la movado". Ne estas bone, se unu organizajo laboru netuŝate de aliaj org-aĵoj, la asocioj landaj plej multe estas simpatiaj al SAT. La LEA'oj estas la viva fonto por SAT. Sen LEA'oj SAT ne havus la esperantistojn, per kiuj ĝi estis fondita. LEA'oj donis al SAT la vivkapablon. SAT respektu tion kaj oficiale interrilatu, por solvi la organizan problemon. Eble ni estonte akiros la lokajn gazetojn, por ricevi ĉiusemajnan angulon. Tiam la propaganda laboro ŝanĝiĝos, kaj la rolo de SAT ankoraŭ pligraviĝos. La porvarbaj asocioj en landoj, kie la aliĝo al SAT estas permesata, simple povus likvidiĝi — ne tiamaniere, ke ili ĉesu nun kaj rekomendu unuopan aliĝon al SAT, — sed tiel ke la reprezentantoj de landaj org-aĵoj esploru, kiel transpreni la taŭgan aparaton kaj organizi kiel *fakon*. SAT ne plu bezonas timi la ekziston de oficialaj *fakoj*, kiuj prizorgas la fakan laboron. Tio nur utilus al la tutmonda movado. Ankaŭ kotiza malpliigo estus aranĝebla, SAT nur bezonus je malmulta mono pliaftigi sian kotizon, kaj la simpligo de la aparato ŝparigus monon. Ni esperebIe trovos bonan solvon.

K-do *Drezen:* Oni parolas pri necesa unuigo de ambaŭ movadoj. Fakte granda diferenco inter la laboro de ambaŭ org-aĵoj ne ekzistas. Tamen ne valoras pro certaj konsideroj, nepre unuigi la movadon. Ekzistas landoj, kie komunistoj estas persekutataj, kie tamen SAT ekzistas legale, kaj ekzistas landoj, kie ambaŭ estas persekutataj. Ni absolute ne povas unuformigi la movadon. Por komuna batalado estas necese, ke ekzistu iu organiza centro (SAT), sed oni povas havi *kelkajn* laborcentrojn, se oni havas la saman labormetodon. Ne estas eble starigi esperantistan internacion. Ni konservu la nuntempan titolon, sed ni zorgu, ke ekzistu unueca pensmaniero en ĉiuj asocioj. Ekzistas kelkaj, kiuj estas iomete opoziciantaj al SAT (la nederlanda, la ĉeka k. a.). Ni kompreneble ne povas akcepti katolikajn esperantistojn (eĉ laboristajn). Sed ĉiuj, kiuj havas la saman celon, ili kune laboru. Estas dezirinde, ke la naciaj lab. esp. asocioj pli intime kunlaboru kun SAT. Ni ne forgesu, ke plej bona rimedo estas SAT, kaj ke Sennaciulo estas preta, enpresi artikolojn pri "labormetodoj" ktp. SAT helpu al la landaj orgaĵoj, kaj ili devas helpi al SAT. SEU decidis, ke ĉiuj aktivaj membroj estu anoj de SAT. Ni ne bezonas specialan novan konstruon, ni nur bezonas alkonformigon al la novaj cirkonstancoj. Ni elektu komisionon por studi la temon.

K-do *Feith:* Se SAT promesas fari konstruan (kaj ne detruan) laboron, mi estas preta kunlabori. La granda ĝisnuna manko estas la "spirito". Mankis en la Asocio la centra instigo al fervora *por*esperanta laboro. La fervora propagandisto ĉe SAT havis ĝenantan senton. En la gazeto respeguliĝu ankaŭ la spirito *por*esperanta. La propagandaj aferoj devas esti traktataj same larĝe en la gazeto, kiel la aliaj artikoloj. Ni restu sennaciecaj, sed ni plifaciligu la laboron, ŝanĝu la titolon: Socialisma Asocio Tutmonda. Ni ja ankaŭ volas gajni ne-esperantistajn rondojn. Devas esti belaj felietonoj en la gazeto, aferoj, kiuj malstreĉas la spiriton. Plie, oni ŝanĝu la titolkapon de Sennacieca Revuo (pro la insigno).

K-do *Slezak:* La lab. esp. movado travivas evoluon, kiel la laborista movado entute. Ne ĉiam estas eble, venigi intern. esp. organizajon al por-esp-a laboro. Ni kiel naciaj esp. orgaĵoj ne faru laboron, kiu apartenas al SAT. Ni povus solvi tiel la problemon de organizo, ke ni ne endanĝerigu SAT, sed tamen internacie kunligu la prolet-esp-an movadon. — Li parolas kontraŭ la sugesto de Feith, pliIarĝigi propagandan temaron en S-ulo. Li deziras, ke S-ulo gardu sian peresperantan karakteron. Dum la kongreso de ALLE montriĝis tre diversaj opinioj. La Kongreso ja ne povas decidi pri la organiza afero, tamen ni provu trovi solvon, ĉar aliokaze de tute alia flanko venos la krevigo. La Asocio ne estu ŝanĝita. La ideo sennaciismo jam vivas inter anoj de ĉiuj tendencoj. Invitu la naciajn org-aĵojn al komuna laboro!

K-do *Nurmi* (Blanka lando): Ni ne povas ŝanĝi konstante de kongreso al kongreso. Ni devas klare scii, kiajn celojn havas SAT, kiajn la nac. esp. org-aĵoj. Kelkaj nac. lab. esp. org-aĵoj estas pli fortaj ol la burĝaj en la koncernaj landoj. Ni devas helpi al la pli malfortaj asocioj en landoj, kie ne ankoraŭ tiom forta estas la lab. esp. movado. Tiam ni plej bone servas al SAT. Ĉar multaj nac. asocioj havas proprajn informilojn, ni ne ŝarĝu Sennaciulon per tiaj informoj. Mi ankaŭ proponas elekti komisionon por studi la problemon.

K-do *Richter* kontraŭparolas la proponon de k-do Feith, ŝanĝi la titolon de S. R. K-do *Feith* konsentas, ke estu donata nur konciza loko en S-ulo al poresperantaj aferoj, sed deziras aperigon de konsiloj pri lernado.

K-do *Guma* opinias, ke la nomoj Sennaciulo ktp. estas tute trafaj kaj klaraj. En Barcelono ne ekzistas lab. esp. organizajo nacia. SAT-anoj estas persekutataj, sed ĉiam propagandas. La tiea SAT-movado profitas el la laboro de la tuta SAT-anaro.

K-do *Svidt:* La nuna Asocio estas bona. Ni nur havas la devon, plinombrigi la anojn. Kiu aliĝas al la loka grupo, tuj fariĝu SAT-ano

K-do *Scheithauer* sciigas la rezultojn de la Propon-komisiono en la organiza demando. Ĝi proponas: "La Kongreso transdonu al E. K. la taskon, rilati kun laboristaj naciaj esp. organizaĵoj kaj raporti dum la venonta Kongreso."

K-do *Revo:* K-do Deubler starigis la grandan taskon, kunigi la tutan esp. lab. movadon. Ĉu tio estas efektivigebla en nunaj cirkonstancoj? Laboristaro ne estas sur ebenaĵo. Ni ne povas eksalti, sed devas iri. SAT ne bezonas naciajn asociojn. Por ĝi sufiĉas ke la k-doj scipovu esp-on. Kial denove refali en animstaton de antaŭ 4 jaroj? SAT restu la spirita centro, sed prenu sub sian protekton la naciajn organizaĵojn, por labori mano en mano. La titolo "internacia" anstataŭ "sennacieca" ne pli bonigus nian situacion (ekz. en blankaj landoj). Ni ne havas intereson, ke la ankoraŭ blindaj k-doj venu al ni, kiel la nederlandaj. La fakon "Kroniko" en S-ulo ni povus pligrandigi, se la gazeto havus pli da paĝoj. Do necesas varbi pli da abonantoj! La propono de l' proponkomisiono estas akceptebla, sed mi konsilas, ke iuj k-doj ne provu atingi ion *ekster* SAT, sed nur *en* SAT. K-do Sproeck fakte mencias pri konkurenca entrepreno. Se tio efektiviĝus, ni scius, kiuj estas la malamikoj de SAT. Pro kiu kaŭzo oni volas detrui la kvarjaran laboron de SAT? Faru laboron, ke SAT venu al fina celo!

Ĉu la enkarcerigitaj pro SAT k-doj ne plorus, eksciante ke oni ne konservos SAT?

K-do *Lanty* atentigas la Proponkomisionon pri danĝero. Li timas, ke se la Kongreso akceptus sensanĝe la tekston proponitan, la kontraŭuloj dirus, ke tio estas antaŭ-aranĝita afero. Ĉi tie estas reprezentantoj el diversaj landoj. La Kongreso do elektu mem el la ĉeestantoj.

K-do *Deubler* aprobas la proponon de k-do Lanty.

K-do *Feith* respondas al k-do Revo, riproĉas ke Senn. Revuo surhavas la motojn kaj insignojn de Sovet-Unuiĝo t. e. de komunista diktatoreco.

K-do *Lanty* (vokas): . . . kaj plumon!

K-do *Richter* admonas k-don Feith, ĉar li ne parolas al la tagordo.

K-do *Feith* (daŭrigas): La unua parto de la respond-artikolo al k-do Sproeck estas tute malĝusta. K-do *Lanty* postulas citon de citaĵoj. K-do *Feith:* Sofistoj kaj sofistaj argumentoj! K-do *Lanty* petas legi la aludatan raporton kaj mem juĝi, ĉu ekzistas insultoj en ĝi.

Laŭ la instigo de k-do Lanty oni iom ŝanĝas la tekston proponitan de la Propon-komisiono, jene:

"*La Kongreso elektas komisionon, kiu interrilatu kun la landaj esp.-organizaĵoj laboristaj pri pli intima interligiĝo kun SAT, kaj kiu raportu ĉe venonta Kongreso pri la rezulto.*"

**La propono estas unuanime akceptata kaj estas elektata la komisiono el jenaj kamaradoj:**

Jonas, Deubler, Scheithauer, Drezen, Limousin, Bässler, Revo, Zavada, Guma, Feith.

---

**Sesa laborkunsido, 13. aŭgusto posttagmeze.**

K-doj B . . . ., Zavada, Barthelmess, Klein, delegitaj de la Kongreso por akcepti ĉe privata stacio la radioparoladon el Moskvo, salute al la Kongreso, sciigas kun bedaŭro al la kongresanaro, ke kvankam la interligo kun Moskvo estis efektivigita, la paroloj de nia k-do (Demidjuk) estis preskaŭ tute ne kompreneblaj pro la pli laŭtaj atmosferaj bruoj kaŭzitaj per la granda distanco. Nur kelkajn malmultajn ne interligitajn vortojn ekkaptis la oreloj.

**Raporto pri la programo de SAT**

K-do *Revo:* Karaj gekamaradoj. Mi petas vin, ne intermiksu kaj maldistingu la programdemandon kun la punkto, kiu staras kiel sekvonta sur nia Tagordo: "Esperanto je la servo de proletariaj organizaĵoj". Ĉi lasta punkto donu al ni la okazon trarigardi la sukcesojn atingitajn pasintjare de SAT ĉe diversaj lab. unuiĝoj sur nacia kaj internacia skaloj, kaj studi la rimedojn per kiuj ni venontjare ankoraŭ pli bone sukcesu por tiri sur esp-on la atenton de tiaj organizaĵoj, por ke ili apliku esp-on praktike por sia bono. Tamen ekzistas intima kunligiteco inter la sekvonta punkto kaj la de mi nun priparolata: Mi intencas paroli pri la principa, ĝenerala parto de nia programo, dume k-do Baessler poste okupos sin pri la detaloj de ĝia ekzekutado.

Multaj el vi certe demandos: Ĉu SAT ne jam havas sufiĉe klaran programon? Ĉu la celparagrafo de nia statuto ne koncize kaj trafe fiksas niajn celojn?

Certe, la celoj je estas klare difinitaj kaj neniu el ni intencas ŝanĝi eĉ nur unu punkton de la celparagrafo de nia statuto. Sed ni devas prikonsideri fakton, kiu ankoraŭ ne ekzistis, kiam ni fondis SAT-on. Antaŭ kvar jaroj, en Prago, ni estis areto da kamaradoj ni starigis organizaĵon embrian, de neniu konatan. Nuntempe SAT estas granda, prosperanta organizaĵo, viglege laboranta kamaradaro, havanta fortajn radikojn en ĉiuj proletariaj rondoj kaj interrilatanta kun granda nombro da laboristaj organizaĵoj politikaj, ekonomiaj, kulturaj ktp. Ni havas grandan nombron da kamaradoj perantaj niajn rilatojn kun la gvidantoj de tiuj organizaĵoj. Kaj tiel jam kelkfoje sentebliĝis *manko* nepre forigenda: Ne ĉiam niaj k-doj tuj trovas respondon al certaj duboj esprimataj de skeptikuloj. Ni devas doni al nia k-daro la ilojn per kiuj ili plej trafe refutu la argumentojn kontraŭ esperanto, kiujn oni ofte aŭdas en proletariaj rondoj, ekz. ke esperanto estas artefaritaĵo, ke ĝi ne havas sociajn radikojn, ke ĝi ne estas historie necesa ktp. ktp.

*Pro tio ni finfine bezonas programon, kiu malkovru antaŭ ĉies okuloj la historian kondiĉitecon de esperanto, kiu sur bazo de la historia materialismo de la mondkoncepto de la klaskonscia proletariaro, montru ke lingvo universala estas ne hazarde kreita, sed fatale elkreskinta el la specifikaj kondiĉoj kaj rilatoj de la kapitalista mondekonomio, kies eroj ni estas.*

Same kiel pli grandaj cerboj ol niaj jam antaŭ tri kvaronoj da jarcento montris ke socialistaj teorio, batalo kaj aspiroj fatale elkreskas el la fundo de la produktadmaniero kaj de la sociaj rilatoj de la nuntempo, ni devas montri ke ankaŭ lingvo universala forlasis la regionon de la spekulacisistemoj "a priori" kaj eniris la realan vivon depost ke la tutmonda etendiĝo de la kapitalista sociordo kreis por ĝi praktikan ekzisteblon. Kaj samkiel la kapitalista ordo kreis ne nur la eblon, sed eĉ la fatalan devigon al aliformigo de la socio sur kolektivisma bazo, lingvo universala fariĝas ne nur ebla, sed eĉ deviga por la laborista klaso en siaj luktoj por kaj dum la konstruado de la nova mondo. Jen kion devas enteni la unua parto de nia programo.

Poste ni devas analizi la interklasajn rilatojn de la kapitalista socio kaj difini la rolon, kiun ludas esperanto en la manoj de la diversaj sociklasoj. El tiu analizo ni devas rekoni ke esperanto povos triumfi nur en la manoj de la laborista klaso, ĉar la aliaj klasoj, precipe la burĝaro, mem detruas la internaciajn rilatojn kaj ligaĵojn, la tutan kulturon — kies ero estas ankaŭ esperanto — la tutan kulturon kiun ĝi mem estas kreinta.

Sur tia bazo estos facile, klarigi logike la celojn de SAT: *Esperanto je la servo de la klasbatalanta laboristaro.*

Flanke de la politikaj, sindikataj, sportaj, kooperativaj ktp. organizaĵoj de la proletariaro, SAT batalas sur la frontsektoro de interpopola interligo, sur kultura kampo. Estas naturе ke, estante sennacieca, ĝi batalu kontraŭ ĉiuj imperialistaj militoj, kontraŭ dogmeco, *en unueca fronto proletaria.*

De la ĝusta fiksigo de ĉiuj tiuj grandaj, kvazaŭ gvidantaj taskoj, dependas nia sintenado en ĉiu aparta, konkreta, detala situacio.

Mi proponas elekton de programkomisiono, kiu dum la tuta venonta jaro, ĝis la VI. Kongreso de SAT, pridiskutu la programdemandon, submetu en nia gazeto proponojn al la diskutado de nia anaro, por ke venontjare ĉiu SAT-ano povu decidi plenscie pri la problemo, por ke ni ricevu programon helpantan al ni, per serioza scienceco, venki ĉiujn kontraŭargumentojn kaj konduki nian ideon al la triumfo por la bono de la tutmonda laborularo klasbatalema.

K-do *Nurmi* konsentas la deklaracion de k-do Revo. Ni diras, ke ni estas internaciistoj, sennaciuloj, tiam ni devas pli multe eviti la uzon de l' gepatra lingvo. Nur per la apliko esp-o vere disvastiĝos.

**Laŭ propono de k-do Revo oni elektas sesmembran komisionon por studi la program-projekton.**

Estas elektataj la k-doj Lanty, Jonas, Nekrasov, Revo, Zavada, Bergiers.

**Esperanto je la servo de internaciaj organizaĵoj.**

Raportanto: k-do *Bässler.*

Esperanto ne estas celo, ĝi nur estas rimedo, por atingi nian celon. Nia celo estas, forigi la imperialistan, kapitalistan sociordon kaj anstataŭi ĝin per la proletara soci-ordo. Esp-o estas unu el la iloj, por forigi la nunan sociordon. Ĉar inter la diversaj malhelpaĵoj, kiuj kontraŭstaras nin, por atingi nian celon, unu estas la diverslingveco. Kelkaj prol. organizaĵoj jam ekkonis tiun malhelpaĵon kaj komencis utiligi nian SAT-aparaton. Ni devas streĉi ĉiujn niajn fortojn, por kontentigi la bezonojn de tiuj organizaĵoj. Ekz. la „Ruĝa Helpo Internacia“ postulas de ni instru-leterojn en esp-o por la politikaj kaptitoj. Aliaj deziras pressciigojn ktp. Tiuj servoj al organizaĵoj plej multe utilas al nia afero, kaj ni devas klopodi elkonstrui bone funkciantan aparaton.

K-do *Zavada* opinias, ke oni povos pligrandigi SAT per enpenetro en sindikatajn kaj kooperativajn rondojn. La internaciaj sindikataj kaj kooperativaj organoj devus aperi en internacia lingvo. Ni devas provi enkonduki esp-on en ĉiujn ĉi organizaĵojn. La samo koncernas la politikajn internaciojn. Pro tio SAT bezonas fakajn grupojn. Ĉiuj internaciaj fakaj organoj aperu en esp-o.

K-do *Drezen:* Ni unue zorgu, ke ni praktiku esp-on en la malgrandaj medioj, kie ni laboras. La akcepto per la org-aĵoj tute ne tiom utilas. En mapli altaj ĉeloj ni plej efike povas agadi. La prof. unioj en Sovet-Unio ne emas akcepti esp-on, sed ili emas akcepti la servojn peresp-ajn. Poste oni petas pri instruo de esp-o.

K-do *Revo:* Estis granda eraro de la lab. esp-istoj (antaŭ 2 kaj 3 jaroj), ke ili ofte iris al iuj lab. kongresoj, prezentis favoran al esp. rezolucion, akceptigis ĝin kaj poste ne plu zorgis pri la praktika efektivigo. La voĉdono favora de iu kongreso estas pure platona deklaracio, kaj neniel efikas. Nun la afero ŝanĝiĝis. Ni havas fortan organizaĵon. Ni ne plu bezonas almozpeti. Kion ni proponas (ekz. al Ruĝa Sportintern), estas niaj servoj (kolono en nia gazeto ktp.). Ne estas multo, kion ni povas prezenti, sed estas io.

K-do *Bässler:* Ĉiu k-do penu, ke la lab. organizaĵoj internaciaj interesiĝu pli ol ĝis nun pri la praktika valoro de esp-o. Tiam ni ne plu bezonos naciajn esp. org-aĵojn, sed nur ankoraŭ peresperantan.

---

**Sepa laborkunsido, 14. aŭgusto matene**

**Pritrakto de la proponoj**

K-do *Scheithauer* nome de la Propon-komisiono prezentas al la Kongreso la proponon I (vidu S-ulo n-o 31) kaj rekomendas la akcepton.

K-do *Lerchner* motivas la rekomendon pro praktikeco. En la Jarlibro troviĝas multaj adresoj, kiujn oni ne povas konsideri kiel aktivaj membroj. Estas simpligo por la administracio, kaj pli da klareco regos inter la membroj.

**La propono estas unuanime akceptita.**

K-do *Scheithauer:* La proponkomisiono rekomendas malakcepti proponon II (vidu S-ulo n-o 32), ĉar ni ne bezonas pli grandan aparaton.

K-do *B* . . . opinias, ke la proporcieco estas pli bone gardata, se oni konsentas ĉi-proponon. Ĉar ekzistas sektoroj kun tre malmultaj anoj kaj iaj kun tre multaj.

K-do *Deubler* deziras malaprobi, ĉar la sektoroj nur servas por elekti DK-anojn. Ni volas eviti sektorismon. Malnecese pligrandiĝus la DK.

**Propono II estas malakceptata** (kontraŭ 1 voĉo).

Laŭ propono de la Propon-komisiono sendiskute **estas akceptata unuanime la Propono III** (vidu S-ulo n-o 32).

Post informiĝoj de k-doj *Effler, Svidt* kaj *Schweinfurter* pri kosto kaj livermaniero de la Jarlibro, la **Propono IV** (vidu S-ulo n-o 32) **estas unuanime akceptata.**

**Proponon V** (vidu S-ulo n-o 39) la proponkomisiono rekomendas malakcepti, ĉar ni ne povas aperigi en S-ulo tutan gramatikan kurson. Pedagogian komisionon ne povas fondi nia Asocio, ĉar ne ĉiu, kiu skribe estas kapabla, ankaŭ kapablas instrui. — **Unuanime malaprobita.**

**Proponon VI** (vidu S-ulo n-o 39) la komisiono rekomendas akcepti, sed oni devas fari kelkajn aldonojn. Se la EK havas tiel grandan rajton kaj ne estas kontrolata kaj ne ekzistas instanco, kiu havas la eblecon procedi kontraŭ maldisciplineco de EK-anoj, estas necese trovi limigon. La komisiono tial proponas jenan aldonon: "Tiujn EK-anojn, kiuj kontraŭagas SAT-interesojn, la Sennacieca Konsilantaro povas eksigi. La eksigita individuo povas apelacii al la plej proksima Kongreso. Tiun decidon la Kongreso aprobas aŭ malaprobas." Krome ankoraŭ jena aldono: "La anoj de la Sennacieca Konsilantaro estu elektataj ĉiuj de la membraro de la koncerna sektoro."

K-do *Deubler* ne povas aprobi la proponon, ĉar EK jam nun havas tiom da estreco, ke la membroj tute ne povas influi al la Asocio. La nuna statuto estas mallonga kaj tial pli klara. EK povas ekzisti el 7 (aŭ 9) membroj, sed ni ne pligrandigu la potencon de la estraro.

K-do *Lanty* konsentas kun la propono, ĉar praktike laŭ nuna stato oni ne povas direkti la Asocion (pro teknikaj kaŭzoj). Necesus radio-aparato. La malnova statut-artikolo estas pli bona, sed ne aplikebla. Rapida solvo de urĝaj demandoj ne estas ebla laŭ ĝi. Tial venis la nova propono de k-do Demidjuk.

**La propono VI estas akceptata** (kontraŭ 5 voĉoj).

**Propono VII** (vidu S-ulo n-o 40) estas jam decidita per la "lingva debato".

Same **Propono VIII.** Rilate al **Propono IX** (S-ulo n-o 40) la komisiono decidis, rekomendi la akcepton, kondiĉe ke la iniciatintoj de tiu propono faru la planon kaj ĉion necesan, por realigi la proponon.

K-do *Zavada* subtenas la proponon, ĉar ni per tio ricevus tute naturajn kaj geografiajn sektorojn. Ankaŭ sennacieca karaktero ne estus tuŝata.

**La propono IX (kun la kondiĉo) estas akceptata** (kontraŭ 1 voĉo).

**Proponon X** (vidu S-ulo n-o 42) la komisiono rekomendas akcepti, ĉar okazis ĉiam diskutoj pro la malaprobitaj proponoj.

K-do *Deubler* esprimas sian opinion pri la nekompetenteco de multaj kongresanoj, kiuj nur vizitas la Kongreson, por aŭdi eksterlandanojn kaj uzi esperantan lingvon, sed ne konas la materion, tute ne interesiĝas pri la organizaj aferoj, kaj mekanike voĉdonas.

**Propono X estas akceptata** (kontraŭ 7 voĉoj).

**Proponon XI** (vidu S-ulo n-o 42) la komisiono rekomendas malakcepti, ĉar estas preskaŭ neefektivigeble kaj malutilas al la SAT-kaso. Pro la diferencoj inter la diversaj valutoj kaj kurzoj estas nature, ke oni tion ne povas aranĝi. **Unuanime malakceptita.**

**Proponon XII** (vidu S-ulo n-o 43) la komisiono deziras malrekomendi, ĉar ni ne havas grupan aŭ landan sistemon, ne estas eble kontroli, ĉu delegito rajtas je tiom aŭ tiom da voĉoj. Ĉar ni havas individuan aliĝon al SAT, ne taŭgas grupa reprezentado. Povus esti, ke k-doj pere de siaj korespondantoj kolektus pli ol 200 voĉojn. Nomojn oni ne povas kontroli.

K-do *Deubler:* Ni devas doni al la membroj la rajton, ke ili estu reprezentataj dum kongreso. Nun la kongreso okazas en Vieno, sed la Vienanoj pripensu, ke eble venontjare la Kongreso povos okazi en Moskvo, kaj ili restos nereprezentitaj.

K-do *Bässler:* La Kongreso ja ne havas decidrajton. Ĝi nur povas decidi pri tiaj proponoj, kiuj ne kontraŭas la celon de SAT. Ekz. en Cassel estis tute neeble kontroli la rajtigilojn delegitajn. Estis granda kaoso.

K-do *Deubler* proponas jenan aldonon al artikolo 10 de statuto en okazo de malakcepto de ĉi-propono: "Statutŝanĝoj ĉiam estu submetataj al la ĝenerala referendumo."

K-do *B* . . . . opinias, ke al la kongresoj nur povas veni monhavantoj.

K-do *Drezen* proponas kompromison: Ĝiskiam niaj kongresoj ne estos laŭorde organizitaj, ĝis tiu momento ni devas laŭeble nin turni al referendumo. Statutŝanĝoj do ĉiam estu prezentataj al referendumo.

K-do *Revo* opinias, ke nekontroleblaj teknike estas la mandatoj (rajtigiloj) dum ni ne havas oficialajn SAT-grupojn. Se SAT plu kreskos, estonte la afero estas konsiderinda.

**La propono XII estas malakceptata** (kontraŭ 8 voĉoj).

**La propono Deubler pri aldono al Art. 10 de Statuto estas unuanime akceptata.**

**Propono XIII** (vidu S-ulo n-o 43) estas sendiskute, **unuanime akceptata.**

(Finota en venonta n-o.)

**SOMERO PASIS. POST RIPOZO EKLABORU KUN NOVAJ FORTOJ POR SAT!**

## KORESPONDEJO

*3414.* Ĉar jam aperis art. pri sama temo, ni ne povas utiligi la vian.

*3632.* Okaze mi uzos viajn art.

*3721.* Vian trad. mi nur uzos en okazo de bezono.

*5141.* Jes, vian leteron mi bone ricevis. Okaze ni eble uzos la spritaĵojn, kvankam ni ne ĝis nun faris tion. Atentu! *Red.*

# Camille Flammarion kaj la naciismo.

Kiel ĉiuj veraj kleruloj, *Camille Flamarion*, la fama astronomo kaj psikisto, kiu lasttempe mortis, ne forgesis protesti kontraŭ la maljusteca ordo kiu regas la homaron. La milito ribeligis lian konscion. Li konsideris la ekzistadon de antagonistaj kaj militemaj patrolandoj kiel postresto de la primitiva barbareco. Same kiel *Blaise Pascal* verkis definitivajn frazojn pri la stulteco de la landlimoj kaj de la patriotismoj, *Flammarion* malhonorige signis la mortigan militarismon kaj la rivalajn naciismojn.

Jen eltiraĵo de *Stella*, kie la mondfama astronomo kaj psikisto diras la veron pri la aktuala barbareco, al kiu la revoluciuloj deklaris senkompatan militon:

"Tiu kompatinda homaro tute ne estas liberigita de la antikva kaj barbara eraro koncerne la naciecojn, kaj ĝi preskaŭ nenion akiris koncerne realan liberecon, ĉar preskaŭ ĉiuj ĝiaj naturrimedoj nur utilas por daŭrigi inter kelkaj grupoj enŝlositaj en artefaritaj kaj variaj landlimoj sentojn de rivaleco, malameco, inciteco, kiuj ĝin eluzas kaj paralizas.

La inteligento estas ankoraŭ tiel bruta, ke la popoloj honorigas la diplomatojn kiuj, per mensogo kaj trompo, okazigis kaj okazigas plej ruinigajn militojn por sin kovri per gloro kaj honoro.

La militarismo estas abomenindaĵo, hontego, stulteca kaj idiota frenezeco.

Ĉiuj de *Eŭropo* kunigitaj registaroj estas malpli inteligentaj ol hundaro aŭ se, vere, ili sian konduton pripensas, proklamas principe kaj rajtige ŝteladon kaj mortigadon. Oni edukas la homojn porti trančilojn en siaj poŝoj kaj interbuĉi kiel brutuloj.

Tiu militarismo estas lernejo de mallaboremo kiu forkondukas la laboristojn for de iliaj okupmetioj.

Tute kateninde freneza estas tiu tera homaro. La hundoj, la katoj, la talpoj, la ostroj, la napoj kaj la kukurboj estas malpli stultaj.

Bestoj kaj kreskaĵoj luktas kaj baraktas por vivi; homoj luktas por la gloro esti buĉataj. Trad. *1255.*

* * *

## Dek diordonoj de l'nuntempa kredemulo.

Testamentaĵo en la lumo de la socikonscio refarita por la tempoj pli malfruaj ol tiuj en kiuj ĝi ĝustatempis.

1. Klaskonscio — via direktanto, — timu iajn interkonsentojn kun malamikoj de via klaso kaj —

2. ne iluziiĝu pri iuj ajn benoj akireblaj per ĉi-agado. Memoru ke teknikprogreson de la Kapitalo en, sur kaj super tero ĝi aplikas nur por via sklavigo.

3. Ne babilu, krieme pri viaj ideoj kaj batalu por praktike efektivigi ilin.

4. Memoru, ke la Unua de Majo — festego de laboruloj — simbolo de venonta glorvenko.

5. Vi estu bona filo de via klaso kaj via partio; sukcesu subigi propran volon bataleman al fermalmola severmalvarma voĉo de l' partio.

6. Militu kontraŭ milito, disiganta kaj dispolviganta viajn fortojn revoluciajn, stariganta vin en pozicio mortmalamika al via fremdlanda frato-laboristo.

7. Detruu malĉastplenan vin- kaj sangmalsekigitan moralon de l' parazitoj; la Nova Mondo kreu novan moralon kaj etikon.

8. Via beno estis forŝtelita de vi; se vi povus forpreni ĝin de parazitoj, vi estus prava.

9. Unuiĝu viaj fortoj kun viaj najbarojsamideanoj en la Komuna unuecfronta luktado por liberigo de l' laboruloj. Estimu ideojn de l' partianoj, eĉ ne samajn kiel viaj, ne manku al ili en ilia laboro, ĉar ioma diferenco en teoriprincipoj neniam malproksimigu unuectendencon.

10. La Tutmondo apartenas al tiu kiu manĝas pro laboro. Enhavprenu ĉion, forĵetinte la infektulcerojn, kiuj lokiĝis sur korpo de l' Nuntempo: — kapitalismo, ekspluatado, religio . . *Dm. Albanov* (*1188*)

# Sennacieca Asocio Tutmonda

*Asocia Sidejo: 23 Rue Boyer, Paris-XXe*
*Adm. Sekretariejo: Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz — poŝtĉeka n-ro 6835*

## OFICIALA INFORMILO

**Celo:** *Utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto, por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda (vidi la Statuton).*

### Punafranko

Jam ofte ni atentigis pri ĝusta afrankado de poŝtaĵoj tamen ni multfoje ricevas nê sufiĉe afrankitajn aĵojn, por kiuj la poŝto postulas altan punafrankon kiu tre ŝarĝas nian etan kason. Estonte ni rifuzos tiajn poŝtaĵojn.

### Monbiletoj

Kamaradoj, kiam vi sendas monon al administrejo, nur sendu bonajn, ĉar ĉifonitajn la banko ne akceptas kaj tiuj monbiletoj estas por ni senvaloraj. Ankaŭ metalmonon ne sendu, ĉar la banko ne pagas la kurzan valoron por tiuj moneroj sed nur la metalan kaj per tio ni malprofitas.

### Aldonu afrankon

Se vi deziras iun ajn respondon flanke de la administrejo aŭ redaktejo, vi nepre forgesu aldoni la afrankon. Ni ne emas daŭre pagi tiujn kostojn el la asocia kaso. Estonte ni ne plu respondos tiajn demandojn. En multaj landoj ekzistas respondkuponoj aŭ respondkartoj. Tamen respondkuponoj estas multekosta afero, pro tio ni ankaŭ akceptas poŝtmarkojn el tiuj landoj kie respondkartoj ne ekzistas.

### Por Ĉinio

Platiel-Landshut, 2,30; Rolo-Leipzig, 3,—; Beranek-Wien, 1,08; Lanty-Paris, 2,—; Barthelmess-Leipzig, 3,—; Iu-Aalsmeer, 0,25; Ribeiro-Porto, 0,46; SAT-anaro-Landshut, 4,—; Krstulović-Wien, 1,77; Fröding-Rockford, 21,— mk. germ. **Sume: 38,86 mk. germ.**

Ĉi-sumo estas ĝirita al ILH.-Berlin.

### Municio por SAT k. ĝiaj organoj

**Britio:** 509-London, 1,— mk.; **Francio:** Migny-Paris, 3,— fr. fr.; **Germanio:** Friedrich-Markranstädt, 0,60; Popolspegulo, 5,— kr. ĉek.; Voigt-Leutzsch, 1,39; Schwenk-Essen, 0,40; Gottschling-Görlitz, 1,05; Tschöp- Leutzsch, 1,—; SAT-rondo-Solingen, 7,30; Jacob-Oelsnitz, 1,50; Schüttelkorb-Essen, 1,—; Szepanski-Dresden, 2,10 mk. germ. **Italio:** Cartosio-Arona, 5,50 lir. **Norvegio:** Muribo-Oslo, 2,— kr. norv. **Sovetio:** Martinenko, 0,25; Kurmanaev 0,25; Tulakova, 0,40; Fiŝer, 0,50; Soroko, 0,30; Grigorjev, 0,35; Jadko-Andreev, 050; Piĉaĥĉi, 0,50; (ĉiuj en Leningrad). **Usono:** Marchevsky-Detroit, 1,— dol.

### Municio por Etiko

Munoz-Paris, 20,— fr.; Stefano-Ivanovo, 0,70 rubl.; Antunes-Castel-Branco, 5,— esk.; Sall-Leningrad, 2,18 rubl.; Muribo-Oslo, 5.— kr. norv.

# Internacia Brodkastado

Aŭskultantoj kiuj kun intereso atentas la estontan evoluon de internacia brodkastado, tre verŝajne estos kontentigataj en siaj aspiroj. La lastatempe anoncita interkonsento rilate al interŝanĝo de programoj inter Britujo kaj Usono estas parto de pli granda plano kiun la Brita Brodkasta Kompanio persiste rekomendadis pere de la Internacia Unuiĝo de Brodkastistoj ĉe Ĝenevo.

Se la porprovaj eksperimentoj en septembro havos la sukceson kiun oni anticipas, estiĝos regula interŝanĝado dum tuta la venonta vintro. Ĉiuj Eŭropaj programoj destinotaj al Ameriko iros pere de la nova 25 kilovata stacio ĉe Daventry (elpar. Dàventri). La korelativa Amerika aparato ne estos preta ĝis post du monatoj, sed kiam ĝi estos preta, ĝi inaŭguriĝos laŭ karakteriza amerikana maniero. Tre verŝajne la Prezidanto brodkastos specialan komunikon al britaj kaj surkontinentaj aŭskultantoj.

Rilate al programoj el surkontinentaj stacioj por britaj aŭskultantoj mi legas en oficiala organo de Brita Brodkasta K'io "Radio Times", ke se ĉio teknike prosperos, kio kredeble okazos, eble en du noktoj ĉiusemajne Daventry ricevos kaj ree disaŭdigos programon el iu brita dominato aŭ el fremdlando, kaj oni havos serion da kanada, amerika, franca, itala, germana, belga, aŭstra kaj hispana "noktoj" laŭ moderaj intertempoj.

Pro tio ke la stacio ĉe Daventry (ondlongo 1600 metroj) uzas tiom multe da elektra energio, eble interesataj k-doj povos profiti la okazon por aŭdi ĉi tiujn programojn.

Aranĝis laŭ informo en "Radio Times" 31. 7. 25
*SAT-ano 2978*

# Radio en Sovetio

### Transdonado per mallongaj ondoj

Je unua fojo en Sovet-Unio, trusto de malfortaj elektro-fluoj komencis eksperimenti radio-transdonadon inter Moskvo kaj Leningrado, per malgrandaj ondoj de 4—50 metroj.

### Konstruado de nova radio-stacio

En Leningrado baldaŭ oni komencas konstruadon de nova forta radio-stacio, ĉe kiu estas starigita speciala transdonilo. Forteco de ĉi-stacio estas dekoble pli forta, ol ekzistantaj nun stacioj en Leningrado kaj Moskvo. La stacio havos 2 mastojn je 120 metra alto. Ĝi estas kunfandita per metalfadeno kun Moskva granda Operteatro, Popoldomo, Palaco de Laboro ktp.

La transdonado de la stacio estos aŭdebla en ĉiuj lokoj de Eŭropo.

* * *

Ĉe radio-ekspozicio en Moskvo estas eksponitaj multaj interesaj objektoj, inter kiuj: transdonilo, kiu laboris kun Ameriko (mallongonda); 20-vatta amator-transdonilo laboranta de simpla elektro-lampingo. Ĉi transdonilo povas labori nokte je distanco de 1500-2000 kilom. Krom tio estas eksponitaj katod-lampoj por mallongaj ondoj kaj granda katod-lampo je 100 kilovat.

*I. Avrunin,* Kremenĉug
*(1122)*

# RECENZEJO

### Gazetoj

**Nova gazeto. Oriento,** n-o 1. Monata ilustrita revuo en esp. Esp. Eldona Kompanio "Oriento", *Harbin,* Manĝurio, Ĥinujo, Novij-Gorod, P. O. Box 35 (julio 1925).

Estas lukse eldonita, 110-paĝa revuo kun interesaj artikoloj pri orienta vivo kaj krome ilustrajoj. La numero kompreneble ne estas tre malmultekosta (1 Yen, t. e. 1,70 gmk.), sed oni devas konsideri, ke ĝi havas la amplekson kaj aspekton de atentinda libro. Se la sekvontaj numeroj same aspektos, ni havos per tia revuo tre bonan kaj detalan informilon pri la Oriento.

### Libroj, broŝuroj

**Foiro de Frankfurt (Main).** Kiel kutime, la foiroficejo atentigas per sufiĉe luksa broŝureto pri la aŭtuna foiro (4.—7. oktobro). Krome interesuloj ricevas volonte informojn pri la foiro de la Foiroficejo (Messamt) en Frankfurt-M., Platz der Republik.

**Specimenfoiro de Reichenberg** same eldonis plaĉan prospekton en esperanta lingvo.

**Svislando.** Karto kaj gvidilo por la turisto. Eldonita de la Svisa Centra Turisma Oficejo Zürich kaj Lausanne.

**Hejma prozo** de *J. Bremon Masgrau,* mendebla ĉe Ferran Montserrat, str. Villaroel 107, 2. o, 2-a, *Barcelona.* Prezo: 1 svisa franko. Tiel nomiĝas 64-paĝa libreto, kiu reprezentas kolekton de tradukoj el hispana lingvo, eldonitaj okaze de la XII. Kataluna Kongreso en Palma de Mallorca. La rakontoj estas interesaj kaj legindaj, sed multaj preseraroj enŝoviĝis kaj ankaŭ kelkaj gramatikaj nekorektaĵoj. Tamen oni senpene povas legi tiujn mallongajn pecojn el nacia literaturo.

**Hebrea progreso en Palestino.** 16-paĝa, ilustrita broŝuro (formato 15×24 cm), eldonita okaze de la Cionista Kongreso en Wien de la Centra Cionista Organizacio, por informi la esperantistaron pri la ĝisnunaj progresoj kaj sukcesoj de la Cionista koloniza laboro en Palestino. La broŝuro estas prezentita al la XVII. Tutmonda Kongreso de Esp. en Ĝenevo. — Kiel ni SAT-anoj pensas pri la cionista problemo, estas pritraktita en la ĉefartikolo de tiu ĉi numero. Kiu havas intereson pri la broŝuro, povas ricevi ĝin senpage de la *Centra Cionista Organizacio* en *London W. C. 1,* 77 St. Russel Street, Anglio.

# Grava informo!

La unua Olimpio Laborista alportis por nia movado gravan sukceson. „Internationale Arbeitersport-Korrespondenz", kies eldonanto estas k-do Jakob Würth, Mannheim U 3, 13, decidis uzi nian lingvon por siaj celoj kaj komisiis min gvidi la Esperanto-fakon. Celo de "jak" estas, raporti pri la sportmovado tra la tuta mondo. Por efektivigi ĉi-celon mi bezonas helpantojn en ĉiuj landoj. Ilia laboro estus traduki la enhavon de informilo, dissendota ĉiusemajne de *Jak,* kaj peri ĝin al la centrejoj de la enlanda laborista sportmovado. Rekompence ili traduku por ni raportojn kaj recenzu el la oficiala kaj publika gazetaro pri gravaj sportaj okazaĵoj. La elspezojn ni repagos kaj ankaŭ cedas modestan honorarion, kiu plialtiĝos laŭ la disvastiĝo de *Jak* kaj laŭ la kvalito de la laboro farota.

*Ad. Wendt, Meyenburg*
Priegnitz, Wallstr. 3.

PRESEJO: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG (GERMANIO)